Laŭzana Esperanto-Societo
Novembro 2019 - n-ro 9

# Laŭzana informilo

## Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 14-an de decembro *Zamenhofa Festo*
- Lu, la 6-an de januaro *Decidota*
- Lu, la 3-an de februaro *Asembleo*
- Lu, la 2-an de marto *Decidota*

*Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano*

**Lunde, la 4-an de novembro, je la 20-a**

**Rosario prezentos sian laboron en EPFL.**

***« La strukturo de kristaloj »***

### *Valo d'Hérens kaj Evolène*

La Valo d'Hérens situas en la franclingva parto de la kantono *Valezo*. Por supreniri al ĝi, oni eliras la urbon *Sion*, laŭlonge de la rivero *Borgne* (Bornj). La vojo trairas Les Agettes, Vex, Euseigne, kie situas la famkonataj geologiaj piramidoj, poste : Evolène-Les Haudères. De tie la valo dividiĝas al la glaĉero de Ferpecle kaj al la baraĵo de Dixence. La ĉefaj montpintoj nomiĝas *la Dent Blanche, la Malgranda Dent de Vesivi*. La distrikto de *Hérens* entenas naŭ komunumojn. *Evolène* estas la distrikta ĉefurbo.

La komunumo menciitis unuafoje en 1250 sub la nomo *Ewelina*, kiu signifas *Akvo dolĉa*. Ekde la dektria jarcento, le regiono dependis de la Nobeloj de *Rarogne* kaj poste estis sub la episkopa povo. La granda komunumaro de *Hérens* estis regita alterne de Prokuristoj de *Evolène* kaj *Saint-Martin*. Ili militrilate servis sub la flago de *Sion*. La kapitano venis el *Saint-Martin* kaj la flagportisto el *Evolène*. En 1840, post la batalo en *Lana*, la deputitoj de *Hérens* kun tiuj de *Sion* kuniĝis por ellabori novan konstitucion. Post la rifuzo de *Federala Dieto* dividi *Valezon* en duon-kantonojn, nova batalo okazis. La vidpunktoj de la franclingvanoj gajnis. En 1882 *Evolène* disiĝis de *Saint-Martin* por fariĝi komunumo.

David Buhlmann

**Laŭzana Esperanto-Societo**

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2019**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

Nia komitato plezuras inviti vin kaj viajn amikojn al la premiero de la filmo

**LA SEKRETA VILAĜETO**

Sa, la 2-an de novembro
ĉe Espace Dickens
Je 16h.: franca versio surtekstita,
Je 17h.: internacia versio,
Je 18h.: aperitivo.
De post tiu dato, la filmo aperos en jutubo: *EsperantoLausanne.*

**Jaŭde, la 21-an de novembro**, nia asocio partoprenos je 16h al
**LA NOKTO DE LA FILOZOFIO**
*nuitdelaphilosophie.ch*
en Espace Dickens, estrante publikdiskuton pri "la Ŝtata Racio".
Venu multnombraj.

Kiel kutime,
**Sa, la 14-an de decembro**
okazos
nia *Zamenhofa Festo*
en l'Auberge d'Epalinges;
ni kune fonduumos.



Bonvolu pagi al nia konto CCP 10-26785-8, sFr 25.- por tiel aligi vin ĝis la 1-a de decembro.

**SEKRETA TEKSTO**

Reconstruu **tekston de Zamenhof** anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

1 i - 1 e - e 2 3 a 2 - 3 ie 4 - 1 ai 5 aj, - 6 ie 4 - 7 e 1 2 a 2 - 7 8 i - 1 i - 6 e 4 6 aj - 7 e 8 2 o 1 oj;

- 1 i - 1 e - 6 8 e 9 a 2 , - 6 e - 1 eŭ 3 8 a 4 a - 10 u 1 9 a 11 e 1 3 o –

10 a 8 o 2 - e 4 - 4 a - 12 o 11 oj - a 1 13 e 4 oj 1 ; -

1 i - 2 14 ia 2 - 3 8 e - 15 o 1 e, - 6 e - 4 a - 12 o 11 oj –

11 a 4 15 o 1 aj - a 1 6 aŭ - 7 o 2 3 e - 8 e 2 3 o 2 - 11 a 4 15 o 1 aj; -

2 e 9 - 1 i - 6 8 e 9 a 2 , - 6 e - 6 o 11 u 1 i 6 i 13 a 9 o - 6 aj - 6 o 1 a 3 i 13 a 9 o - 2 u 8

- 1 eŭ 3 8 a 4 a - 10 u 1 9 a 11 e 1 3 o - 10 o 8 i 16 o 2 - a 4 11 e 1 aŭ - 4 a - 16 8 a 1 9 a 1 –

a 11 a 2 o 1 - 9 e - 3 iuj - 15 e 2 3 a 17 oj - 6 aj - 6 8 i 11 oj, -

6 iuj - e 2 3 a 2 - 6 aŭ 18 a 3 aj - 1 e - 9 e - 11 a 4 15 o 1 a - 5 o 4 o, - 2 e 9 –

2 i 11 7 4 e - 9 e - 2 i 1 1 e 6 o 1 a 9 o - 6 aj - 9 e 5 i 16 a 3 a - 2 i 1 a 4 3 8 u 9 a 9 o.




**SEKRETA TEKSTO**

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

# **Karlo** de Edmond Privat

## naŭa ĉapitro: *Ekzameno*

La matenon de la ekzamena tago Karlo alvenis tre frue en la korton de la liceo. Li portis belan ledan sakon, tute novan, kiun lia patro ĵus donacis al li. En ĝi estis papero kaj skribilaro kun inkujo, plumoj kaj krajonoj en blua skatolo. En la korto estis jam kelkaj knaboj, sed neniu konata de Karlo. Ĉiumomente alvenis kelkaj aliaj. Fine Karlo ekvidis kamaradon, kiu ĉeestis du jarojn kun li la lernejon de S-inoj Linar. Lia nomo estis Henriko Belnett.

Karlo tuj iris saluti Belnett kun granda ĝojo, ke li fine trovis iun konaton. Belnett jam de unu jaro estis lernanto ĉe la liceo. Sed li malsukcesis la jarfinan ekzamenon kaj devis ĝin reprovi nun.

Karlo rimarkis, ke la plimulto el la knaboj havas sian ĉapon flanke aŭ malantaŭe sur la kapo. Kredante, ke tio estas kvazaŭ oficiala kutimo, Karlo atendis momenton, kiam neniu lin rigardas, kaj rapide maldekstren puŝis sian ĉapon. Sed tio ne longe utilis ĉar la sonorilo tuj eksonoris, kaj ĉiuj knaboj ekiris al la ŝtuparo super la kolonoj. Sekvante unu la alian kvazaŭ ŝafoj, ili supreniris. Supre ili trovis profesoron kun longaj lipharoj, kiu ordonis, ke ili malsupreniru kaj eniru la trian pordon ĉe la maldekstra konstruaĵo.

Apud la malfermita pordo troviĝis la direktoro parolanta kun tre altkreska profesoro. Tiu ĉi senpense saltigadis la ŝlosilon de la klaso super sia mano kaj ĝin ĉiufoje rekaptis. Malantaŭ Karlo eniris malgrasa kaj pala knabeto kun bone kombitaj haroj. Li ŝajnis tre bonmaniera kaj ankaŭ timema. Jam en la korto li forprenis sian ĉapelon por peti sciigon de Belnett, kies laŭta ekridego forflugigis lin kvazaŭ timigatan birdeton.

Kiam ĉiuj estis en la klaso, la malgrasa knabeto venis sidiĝi apud Karlon. La granda profesoro envenis kaj energie fermis la pordon. Karlo opiniis, ke li estas certe bona kaj afabla viro, ĉar li havas tiel brilajn okulojn kaj tiel belan nigran barbon.

- Mi diktos nun la ekzamenajn demandojn, li diris; vi havos unu skribverkaĵon, kiu utilos samtempe kiel ortografia, historia kaj geografia ekzameno. Skribu: Kion vi scias pri Afriko? Vi devas skribi almenaŭ tri paĝojn kaj ne pli ol kvar. Nun la dua demando estas problemo; skribu: lu Sinjoro A aŭtomobile veturas kun rapideco de dudek-sep mejloj en unu horo, kaj alia aŭtomobilisto B veturas sur la sama strato kun rapideco de kvardek-unu mejloj en unu horo; kiam la dua renkontos la unuan, supozite ke S-ro A forveturis de la urbo je la naŭa kaj duono matene kaj S-ro B forveturis de la sama loko je la deka matene?

Poste komencis la silenta laborado. De tempo al tempo iu brue ektusis. La granda profesoro promenadis tra la ĉambro. Ĉiufoje kiam li apudpasis, la pala knabeto flanke de Karlo ektremis kaj haltis en sia skribado.

# **Intervjuo de Charlotte Blanc Maillard,**
## **Honora Membro de LES**



(Fare de Francisko)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis en la friburga kamparo la 10an de januaro 1944. Kiam mi 25jaraĝis mi edziniĝis kun Karlo. Li nomis min Karolina. Ni havis du idojn: Stéphanie kaj David. Antaŭ 25 jaroj ... post 25 jaroj mi eksedziniĝis. Do, nun komenciĝas la kvara kvarono de mia vivo. :-))**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En 1988, mi vojaĝis tra Aŭstralio. Dum tiuj ferioj sinjorino parolis al mi pri ĝi.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**5 jarojn poste, kiam mi loĝis en Châtel-St-Denis, mi kontaktis LES kaj komencis studi esperanton en la Popoldomo kun Nicole Margot ... unufoje semajne.**

*. Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Ĉiuj kritikis, ankaŭ mian decidon iri al KCE, dirante: *"Kion vi serĉas en tiu sekto?"***

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Nur mian filinon Stéphanie, kiu studis esperanton en Nov-Zelando en 1989.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**En 1995, kun mia amikino Tina, mi kongresis - la unuan fojon - en Tempereo / Finnlando. Mi rememoras multnombrajn rusojn, kiuj vendis lignajn kolĉenetojn kaj brakringojn por pagi ilian busan vojaĝon, kiu daŭris por multaj pli ol 48 horojn.**